Informilo de Scienca Sekcio de TKKE

Numeero 1 Aperas neregule Marto 1957

**Scienca sekcio de TKKE ekfunkciis**.

En tiuj ĉi tagoj ekfunkciis scienca sekcio de TKKE. Provizore – ĝis la elekto dum kunsido de la sekcio en landa konferenco – gvidas la laboron de la sekcio la sekvanta komitato:

prezidanto: PhDr Jaromír Jermář. Scienca laboristo de Filozofia Instituto de Ĉeĥoslovakia akademio de Sciencoj; Jabloňová 23, Praha 10

vicprezidanto: Ing RTDr. Miroslav Krejčíř, scienca laboristo de Instituto por Esploro de Neercaĵoj, Antonínská 12, Brno

sekretario: PhMr Jaroslav Hanuš, esplora laboristo de farmakologia laboratorio ĈKD, estinta reprezentanto de ISAE en ĈSR, Navrátilova 4, Praha 2

Adreso de la sekcio; Praha 10, Jabloňová 23

**Aliĝo al la Sekcio.**

Ni petas ĉiujn esperantistojn - sciencajn laboristojn - senprokraste sendi al nia sekcio la sekvantajn datojn: 1. nomon kaj antaŭnomon; 2. adreson de loĝejo; 3. okupon; 4. laborejon kaj adreson de laborejo: 5. sciencan fakon, en kiu li deziras labori en la sekcio; 6. membrecon en aliaj sciencaj organizaĵoj; 7. membrecon en esperantistaj organizaĵoj; 8. finitajn aŭ preparitan laborojn utiligeblaj en nia sekcio.

La membreco en nia sekcio estas senpaga. La Informilon ricevos venonte nur tiuj samideanoj, kiuj ancncos sian kunlaboron en la sekcio.

**Esperantologio kaj interlingvistiko**

Nia sekcio klopodos organizi ankaŭ seriozan laboron kaj esploron pri esperantologio kaj interlingvistiko. Tiu ĉi laboro estas hodiaŭ, kiam sciencistoj komencas serioze pritrakti la problemon de la internacia lingvo (ekzenple en Voprosy jazykoznanija) tre urĝa. Ni vokas ĉiujn samideanojn, eĉ amatorajn, kiuj okupas sin pri historio, evoluo, strukturo kaj aliaj problemoj de la internacia lingvo, aliĝi al nia sekcio.

**Fakaj terminaroj**

Ni petas ĉiujn samideanojn, kiuj preparas aŭ finpreparas fakvortarojn, tuj anonci tion al nia sekcio kaj samtempe al terrminologia sekcio de Internacia Scienca Asocio Esperantista, Dipl. inĝ. R. Hafekorn, Konigsseer Strasse 50, Berchtesgaden, DBR. Ni regule donos en nia informilo informojn pri preparitaj laboroj de niaj anoj kaj ankaŭ informojn pri laboroj de terminologia sekcio de ISAE, por ke oni povu kunigi la samfakulojn kaj ŝpari energion.

Laŭ la laataj informoj de la Terminologia sekcio de ISAE oni terminologie prilaboras sekvaritajn fakojn: filozofion, teologion, agrikulturajn maŝinojn, plantselektadon, plantpatologion, pomologion, arbarfakon, hortikulturon, bestbredadon, matematikon, astronomion, meteorologion, medicinon.

**Kunlaboro knn Internacia Scienca Asocio Esperantista**

Nia sekcio funkcias samtempe kiel landa sekcio de ISAE. Tial ĉiu membro devas fariĝi ankaŭ membro de tiu ĉi grava scienca organizaĵo. Membrokotizo estas pro Ĉeĥoslovakio 20 Kcs (kun abono de Scienca Revuo), membro-apoganto (sen revuo) pagas 3 Kčs. Aliĝojn, kun necesaj datoj alsendu al nia sckcio, kiu sendos al vi pagilon.

**Esperanto kaj Sociologio**

Ni atentigas niajn membrojn pri modela laboro de Internacia Komisiono "Esperanto kaj Socioloĝio", kiu kunigas ĉiujn ssperantistojn laboristojn en sociaj kaj socialaj sciencoj. La komisiono sukcese intervenis dum la IIIa internacia sociologia kongreso en Amsterdam por Esperanto. Adreso de sekretariejo: Moerweg 76, Den Haag, Nederlando.

**Fremdlandaj vizitoj**

En la monato oktobro 1956 vizitis nin profesoro Jozef Toczyski, delegito de ISAE en Pollando (Gdansk-Wrzeszcz, ul. Grunwaldzka 6, m. 3), kun kiu ni pridiskutis problemojn de scienca vivo esperantista en Pollando.

Dr Jaromír Jermář vizitis en la monato aŭguuto 1956 la ĝeneralan sekretarion de ISAE – profosoron Božo Popovič (Sarajevo, Zagrebačka 18) por aranĝi la aliĝon de nia sekcio al ISAE.

Ni vane atendis la viziton de fama japana sciencisto Fujio Egami, funkciulo de la Monda Federacio de Sciencaj Laboristoj.

**Preparataj laboroj de niaj membroj**

Samideano Erhard Urban (Vlastejovice 47) finpreparis fakan manĝaĵ-terminaron en ĉeĥa, angla, franca ka j esperanta lingvoj. La terminaro enhavas ĉirkaŭ 2000 terminojn.

Samideano Ing Dr Miroslav Krejčíř (Brno, Antonínská 12) finpreparas fakan terminaron "Arboj kaj arbustoj" en ĉeĥa, esperanta, angla franca, germana kaj rusa lingvoj. Dr Krejčíř estas membro de la terminologia sekcio do ISAE por arbarfako.

**Al samideanoj, kiuj skribis al ni**

Ni dankas pro via propono de kunlaboro. Ni bezonas ĉies helpon. Bonvolu atente tralegi tiun ĉi Informilon kaj resendi al ni viajn aliĝojn kun personaj datoj. Ĉiam, kiam vi korespondas kun nia sekcio, aldonu poŝtmarkon. Nia sekcio ricevas nenian subtenon.

Redakcio: Scienca sekcio de TKKE, Dr Jaromír Jermář, Jabloňová 23 Praha 10

Eldonas: Esperantista klubo ĉe Osvětová beseda en Praha 2